# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MARTO/APRILO 2016** **Nro. 107 (2/16)**

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 20 de mayo, a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

**Orden del día**:

1. Lectura y aprobación, si procede, de las actas de la asamblea general anterior (22/05/2015).
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2015.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2016.
4. Nombramiento de una nueva junta directiva.
5. Informaciones varias.
6. Ruegos y preguntas.

## ĜENERALA ĈIUJARA JARKUNVENO.

Tiel kiel vi povas legi ĉi-supre, la **vendredon 20-an de majo, je la 19,30 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

**TAGORDO**:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokoloj de la lasta kunveno (22/05/2015).
2. Same pri la spezoj de la jaro 2015.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2016.
4. Nomumo de nova estraro
5. Diversaj sciigoj.
6. Proponoj kaj sugestoj.

## LOKE ...

## FORPASIS …

Dum la lastaj tagoj ni sciis pri la forpaso de nia amiko **Celestino Gómez Cuevas**. Lastjare ne tiel ofte li ĉeestis nian Grup-ejon, sed li kutimis alveni por la ĝeneralaj kunvenoj.

Okaze de lia forpaso, ni memoras ankaŭ pri lia nederlanda edzino, Frieda van Houten, ege afabla kaj simpatia homo, fervora esperantistino, kiu mortis antaŭ sufiĉe da jaroj.

## Niaj legantoj reagas…

De tempo al tempo, niaj legantoj skribas al ni por transdoni opiniojn pri “Nia Ponto”, sendi dankojn aŭ kritiki. Jen du lastaj ekzemploj:

Karaj gesamideanoj:
dankon al vi chiuj kaj chefe al Jesus Miguel pro la jhus ricevita kaj interese legita Nia Ponto. Mi esperas ke vi bone salutos Eduardo pro lia venonta naskighdatreventagfesto, la nauan de Marto.
Amikajn salutojn,
Paulo el Lisbono

Mi trarigardis vian bultenon.
Du kritikoj: temoj nur pri Hispanujo
Skribmaniero STRANGAJXO, kiu estas tute ne-oficiala kaj kontraufundamenta en publika teksto.
Johan Derks, Belgrado

## Nova naskiĝtago de nia E-Grupo.

La venontan 20an de majo la E-Grupo de Bilbao iĝos 110-jara.

## CUOTAS DEL AÑO 2016.

Cuando queráis, podéis hacer el pago de vuestra cuota anual. El número de cuenta está en la primera página de este “Nia Ponto”. Y no olvidéis que las cuotas han cambiado:

Cuota normal: 60,00 € anuales. (5 € al mes)
Cuota familiar: 70,00 € anuales. (5,83 € al mes)

¡¡Muchas gracias por vuestra colaboración!!

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**30 jun-04 jul. 2016**. 75-a Hispana Kongreso. Herrera del Duque (Ekstremaduro).

**16-23. jul 2016**. 72-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Wrocław, Pollando.

**23-30 jul. 2016**. 101-a Universala Kongreso. Nitra (Slovakio).

**20 - 27. Aŭgusto**. 83-a Itala Kongreso de Esperanto - Frascati, Italio. Abundos prelegoj, muzikaj prezentoj kaj ekskursoj al centr-italaj turismaĵoj. Kompreneble Romo el nia vidpunkto povas esti konsiderata periferio de Frascati, kaj tie nin akceptos la papo en ĝenerala aŭdienco. Ni kaj 250 aliaj kongresanoj el la tuta mondo atendas vin. Inf.: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano, Italio. Rete. kongreso@esperanto.it aŭ iej@esperanto.it

**julio 2017**. Karavano al Seulo - Rusio-Koreio. Korea Esperanto-Asocio invitis UKon 102 de jaro 2017 en Seulo, Koreio. La Vojaĝo anoncas novan projekton, Karavanon al Seulo por partoprenantoj de planata kongreso. Laŭ anticipa plano ĝi itineros laŭ la fama Trasiberia fervojo (9298 km/ 4,607 mejla), la plej longa fervoja itinero en la mondo. inf.: La Vojaĝo.




## KIAM, KIE, KIO OKAZAS? - INTERNACIA KALENDARO.

La "Internacia Kalendaro" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

- **Vojaĝu** al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon, kun datoj, nomoj, mallonga priskribo, reteja adreso, ktp!
- **Se mankas iu aranĝo,** anoncu kaj registru ĝin senpage!
- **Diskonigu, reklamu** la Kalendaron al viaj Esperantistaj amikoj

La Internacian Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto. La Kalendaro funkcias ekde 1996, kaj enhavas jare ĉ. 250 E-aranĝojn.
**Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro:** http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm

Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin: *Szilvási László, szilvasi@eventoj.hu*

*(Ret-Info / Lingvo-Studio, LS http://www.eventoj.hu)*

## H.E.F.

## 75-a HISPANA KONGRESO.

(Herrera del Duque (Badajoz). 30 jun. / 04 jul. 2016)



Je la 27-a de aprilo jam estis 136 aliĝintoj.

En la programo oni donos atenton al la diverseco ene de la regiono Ekstremaduro. Tio ankaŭ estos kialo por konigi Esperanton al la loĝantaro de la urbo kaj la ĉirkaŭaĵoj. La komarko fakte nomiĝas Siberia, kaj tiele oni klopodos ian ĉeeston de siberianoj en la kongreson, kio utilus kiel ĝemeligo de tiom apartaj popoloj.

Parto de la kulturaj programeroj fokusiĝos sur la celebrado de la firmiĝo de la Ibera Skolo de literaturo en Esperanto. Ni atendas la partoprenon de bona parto de tiu verkista grupo.

Ne mankos rilato al specifa lingvostato de la regiono, kaj konigado de diversaj aspektoj de la kulturo en la regiono. En tiuj datoj ekas la famkonata Festivalo de Klasika Teatro en Merido. Ni esperas doni specialan rolon al la teatro, akorde kun la tradicio de la lastaj hispanaj kongreso. Ankaŭ ne mankos muzikaj prezentadoj, prelegoj, atelieroj, ludoj, distraĵoj kaj vizitoj. Oni ekskursos al fama monaĥejo kaj tipa vilaĝo Guadalupe.

**TURISMA PROGRAMO KAJ POSTKONGRESO.**

Dum la kongreso, partoprenantoj havos la okazon koni kaj ĝui la urbon Herrera, mirindaĵon de la malnova popola arkitekturo, kun ties ĉefplaco, nobelaj domoj, palacoj, monaĥejoj kaj la trankvila vilaĝa etoso. Estas antaŭvidataj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵoj, inter kiuj surmonta Kastelo kaj diversaj lokoj de la lagaj pejzaĝoj. Ĉefa vizito estos al **Guadalupe**.

Oni programos turisman Postkongreson la 4-an de julio, por tiuj kiuj povos plilongigi sian ĉeeston en la regiono. Oni celos **Meridon**, **Trujillo** aŭ **Don Benito-Medellín**.

## LEGADO DE DONKIĤOTO.




Kiel jam tradicie, fine de aprilo okazos la publika legado de Donkiĥoto en kulturinstitucio “Círculo de Bellas Artes”. Ankaŭ esperantistoj partoprenos, la sabaton 23-an de aprilo je la 6-a vespere, per laŭtlegado de kelkaj paragrafoj de la verko en Esperanto.

*(Nia Voĉo -- Madrida Esperanto-Liceo. 05/04/2016)*

# PUBLIKA PREZENTADO DE BOHEMIAJ LUMOJ.

La pasintan 19-an de marto estis publike prezentita al la ĝenerala publiko la traduko al Esperanto de la verko de Ramon María del Valle-Inclán, “Bohemiaj Lumoj”.

La prezentado okazis en la teatrejo Kubik Fabrik, spaco alternativa kaj moderna en la kvartalo Usera. La salono pleniĝis per interesita publiko.

La aranĝo konsistis el prezento de la libro, fare de ties tradukisto, nia samklubano Miguel Fernandez, kiu estis prezentita de Mati Montero. Poste okazis aktorita leg-prezentado de ĝia dek-dua sceno. Rolis en la prezento:

· Makso: Miguel Fernandez
· Sinjoro Latino: Jorge Camacho
· Najbarino: Ana Manero
· Pordistino: Matilde Montero
· Rakontanto: Felix Jimenez Lobo

La tuta sesio estis filmita, kaj oni povas ĝin spekti en la jutuba kanalo de MEL: https://www.youtube.com/watch?v=fPE7d935pDE.

*(Nia Voĉo -- Madrida Esperanto-Liceo. 05/04/2016)*

## Anarkiismo en la furorlisto.

En la marta (do la plej ĵusa) numero de la revuo "Esperanto" aperas la listo de la plej venditaj libroj dum la jaro 2015 ĉe la libroservo de UEA. Sur la dekstra vico, tiu de unuopaj vendoj, aperas "Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo", de Miguel Fernández.

*(Manolo Parra. 20/04/2016)*

# PLIBONIGOJ EN LA RETEJO DE NIA BIBLIOTEKO.

Ĉu vi konas la retpaĝon de la **"Biblioteko Juan Régulo Pérez"** de Hispana Esperanto-Federacio? Ĝi ĵus ricevis novan fasonon, do estas bona momento por ke vi esploru ĝian enhavon. Ne temas nur pri fizika biblioteko, sed pri vera katalogo de la kulturo en Esperanto. Ĵetu rigardon en la adreso: http://www.esperanto.es/biblioteko

Krome, komence de januaro estis kreita la rikordo n-ro 5000 de la virtuala biblioteko, la *Bitoteko*. Temas pri numero de la iama revuo de la junulara sekcio de HEF, "HEJS-Juneco", kiu ekzistis dum al 60aj kaj 70aj jaroj. Multkiale interesa revueto. Ĉiukaze enestas en nia arkivo pli ol 5000 dokumentoj en la datenbanko ĉar plurfoje okazas, ke la sama rikordo utilas por kolekteto da ili.
Esploru niajn trezorojn!

*(El la “Bitbulteno” de HEF)*

## AMO-Seminario dum la Hispana Kongreso.




Hispanio gastigos tritagan AMO-seminarion (29-a de junio-1a de julio 2016); *AMo-seminario*, aŭ Seminario por Aktivula Maturigo estas iniciato de UEA jam celebrita en pluraj landoj de la mondo por trejni aktivulojn kaj por organizi kunan laboron. La elektita temo, aparte grava por nia Movado, estos rilata al informado: "Aktualaj eblecoj por disvastigi Esperanton". Sara Spanò, Komisiito de UEA pri Aktivula Maturigo, enkondukos la AMO-programon

# TRA LA MONDO …

## MARIONETISTOJ KAJ ESPERANTO.

Antau kelkaj monatoj estis forta kverelo en Hispanio pri marionetteatrajxo por infanoj; grandparte la diskuto pligrandigxis pro tio ke en gxi enmiksigxis la politikistoj. La diskuto temis pri tio ke la enhavo de la ludo ne estis adekvata por infanoj. Kaj jen kurioza skribajxo pri la temo en “El País” (“La Lando”), unu el la cxefaj jxurnaloj de Hispanio:

Una de las declarantes ha sido la mujer que denunció la obra ante la policía. Esta testigo acudió a ver la representación, en la plaza del Canal de Isabel II, con su hija de dos años. Pasado siete minutos, se levantó “horrorizada” y acudió a una cafetería cercana a avisar a los agentes. Según ella, los personajes de la obra hablaban un **idioma “ininteligible”**. Jaime Montero, uno de los abogados de los titiriteros, explicó que La Bruja y Don Cristóbal se representaba en tres idiomas: la presentación era en castellano, los diálogos de los personajes principales en **esperanto** y el parlamento del juez, en latín.

*(“El País”. 16/03/2016)*

## Pri la sama afero …

La hispanlingvan prezenton de *Bohemiaj lumoj*, kiun la pasintan 19an de marto mi faris en la madrida teatro Kubik Fabrik, mi komencis per jenaj vortoj, kiujn mi prezentas al vi esperantigitaj:

“Permesu al mi komenci per laŭdo al la liber-esprimo, lastatempe tre mistraktata en ĉi nia mistraktata lando, kie ekzistas “buŝoŝtopile rolantaj leĝoj” kaj sintenoj limantaj “esperpenton”. La aresto de la pupteatristoj de la trupo *Pupteatro de sur la subo*, de Granado, surbaze de tio dirita kaj farita ne de ili, sed de iliaj marionetoj, konstituas unuarangan esperpentan materialon, kiun Valle-Inclán povintus enmeti en sian *Bohemiaj lumoj*. Laŭe al tia “regulo de tri”, ne Valle, ĉar li ne plu ekzistas, sed mi mem povus esti arestita tial, ke mi lokis sur la lipoj de personoj en ĉi verko esperantajn esprimojn, kiuj prisatiras respektindajn instituciojn de la ŝtato kaj eminentajn partianojn de la starigita ordo. Sed, okazas, ke, krome, la personoj en la pupteatraĵo tenis dialogojn en Esperanto kaj do ni, ĉiuj praktikantoj de ĉi lingvo, povus fariĝi suspektemaj en la okuloj de la sinjoroj, kiuj ordigis la areston. Ĉi-sence, aldonindas kuriozaĵo, kiu, krom evidentigi la malklerecon de la aŭtoritatoj en la Franco’a diktaturo (1939-1978), manifestas la ĉiaman aktualecon de la feroca kritiko emananta el *Bohemiaj lumoj*. Tiun kritikon la tiama cenzuro kredis adresita al la naci-katolikisma reĝimo kaj provis elimini ne nur frazojn sed eĉ kompletajn scenojn. Hontigas konstati, ke preskaŭ unu jarcenton post la apero de ĉi verko uzatas tiuspecaj praktikoj”.

En la ĉi-pria protesta koncentriĝo farita ĉe la pordo de la madrida urbodomo por postuli la elkarcerigon de la pupteatristoj, kelkaj madridaj esperantistoj portis kaj montris ekzemplerojn de *Bohemiaj lumoj*.

Dume, putruloj, koruptantoj, koruptitoj, ŝtelistoj kaj vampiroj de ni ĉiuj... socia feĉo kiel Rato kaj uloj tiuspecaj ĝuas liberon.
Kia honto!

*(Miguel Fernández. 23/04/2016)*

## Forpasis Michel Duc Goninaz.



Nun venis la malfeliĉiga mesaĝo pri la hodiaŭa forpaso de nia kolego, Profesoro Michel Duc Goninaz. Nia movado, la tuta Esperantujo havas grandan perdon. Ni invitas vin kondolenci kaj rememori en la Panteono.

*(Edukado.net, pere de SATEH. 26/03/2016)*

## J. VERNE kaj Esperanto.

En Huesca okazis seminario pri J. Verne kaj alvenis elstaraj fakuloj. Mi profitis por demandi pri la rilato inter Verne kaj Esperanto. Oni ne alportis multe.

Tamen, inter la publikajxoj prezentataj estis verko de Abel Montagut [la lasta romano de J. Verne, kie menciatas Esperanto, reskribata de Abel Montagut]:

***TIERRANEGRA. El último viaje extraordinario.***
**(Jules Verne, Michel Verne, Abel Montagut)**
Editorial Paganel. Sociedad Hispánica Jules Verne. Abril, 2016.

Ni memoru ke Abel alportis tre interesajn informojn pri la afero.

P.S.: Krome, pri la afero menciindas komentoj faritaj de Istvan Ertl (aperintaj en "Esperanto" kaj "La Ondo"):

*“Esperanto estas simpla, fleksebla, harmonia lingvo, kiu taŭgas same por eleganta prozo kiel por harmoniaj versoj. Ĝi kapablas esprimi ĉiujn pensojn kaj eĉ la plej fajnajn sentojn de la animo… Ĝi estas la ideala internacia lingvo”.*
*Ĉu citaĵo el propaganda broŝuro pionir-epoka? Ne: temas pri frazoj el la lasta romano de franca verkisto-fantaziulo, kies revoj, kvankam ili plejparte jam plenumiĝis, ĉiam plu revigas la homojn: Jules Verne.*
http://sezonoj.ru/2013/02/220trezoro/

*(Lorenzo N. 14/04/2016)*

## *Gagarin: la unua kosma flugo en la historio!*

Antaŭ 55 jaroj, la 12-an de aprilo en 1961, la sovetia armea piloto Jurij Gagarin per la kosmoŝipo Vostok-1 (Oriento) faris la unuan en la mondo flugon ĉirkaŭ la terglobo. Lige al la datreveno aperis interesa artikolo de Grigorij Arosjev en la revuo "La Ondo de Esperanto", kaj en ĝi interesa penso: *Li estas tre pozitiva kaj grava personeco, kaj li mortis "ĝustatempe"...*

*(Lingvo-Studio / Szilvasi Laszlo, LS. 12/04/2016)*

## Evildea –R. Delamore– La plej aktiva kaj stulta E-Jutubisto.

*El la lasta numero de la revuo “KONTAKTO”,* revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

“Saluton al ĉiuj! Jen Evildea, via dio!” Tiel komenciĝas ĉiuj videoj de Richard Delamore en sia YouTube-kanalo en Interreto. Sub la kromnomo Evildea (kunmetaĵo

por Evil [malbono] kaj Idea [ideo]), la 29-jara aŭstralia esperantisto praktike ĉiutage afiŝas novan videoblogaĵon. En la videoj li parolas pri diversaj aferoj, pri la lingvo kaj movado, sed ankaŭ pri sia propra vivo, siaj pensoj, inter aliaj stultamuzaj videoj. I (...)

Richard apartenas al nova generacio de esperantistoj, kiuj lernis Esperanton per Interreto (li memlernis per lernu.net) kaj por kiu la uzado de novaj teknologioj multe gravas por kreskigi la komunumon ĉirkaŭ la lingvo. Laŭ li, tiu teknologio estas malbone uzata de la movado kaj rezulte Esperantujo vere suferas pro granda manko de filmita materialo en kaj pri Esperanto. (...)

*Lia trafa konkludo :*

Esperantistoj devas esti pli progresemaj rilate la artojn kaj sciencojn ol la cetero de la mondo. Tio ne estas facila tasko, sed ĝi estas la sola vojo antaŭen. La problemo estas, ke la plejparto de Esperantujo rigardas la orajn jarojn de la frua movado sen serioze konsideri kaj utiligi la ilojn de la moderna mondo. Ekzemple, mi certas, ke vi ĉiuj aŭdis la anekdotojn de la avo, kiu demandas sian nepon por asisti pri teknologiaj problemoj. Ni devas ĉiam turniĝi al la plej junaj membroj de nia socio por vidi la vojon antaŭen. Ni devas esplori kaj utiligi la tendencojn de la junularaj movadoj ekster Esperantujo.

==> **https://www.youtube.com/user/EvilIdeIa**

*Sukcesegojn al li !!!    La E-movado nepre bezonas tiajn aktivulojn ...*

*(Pere de G. Pirlot. 25/02/2016)*

## Demisio de Stefano Keller, estrarano pri eksteraj rilatoj de UEA.

22-a de aprilo 2016. *Al la Komitato de UEA.*

Estimatoj,

mi informas vin per tiu chi mesagho pri mia demisio - pro diversaj kialoj, kaj kun efiko/valideco hodiaua - el mia estrara funkcio/ofico ghis nun plenumita kiel estrarano respondeca pri eksteraj rilatoj, hodiau anoncita al la Estraro, Ghenerala kaj Vica Ghenerala Direktoroj de UEA.

Mian taskon pri la aktuala estrarraporto mi jam plenumis, mian raportan parton jam liveris al la Prezidanto de UEA kaj ghi estas je dispono ankau che mi.

Mia foriro el la Estraro ne signifas ke mi chesas chiun aktivecon kaj kunlaboron kadre de UEA, mi restas esperantisto, aktiva membro de la asocio, daurigos miajn agadojn en la movado, kaj laboros ekster ghi por la lingvaj rajtoj de chiuj, por la disvastigo kaj uzo de la internacia lingvo, Esperanto, lau la homaranisma mesagho de L. L. Zamenhof.

Mi estos je la dispono de la nova estrarano pri eksteraj rilatoj por respondi al eventualaj demandoj ligitaj al tiu ofico kaj laboro, kaj por helpi tiun personon en la enoficigho.

Kun koraj salutoj,

Stefano Keller

Demisianta estrarano pri eksteraj rilatoj de UEA, Komitatano C kaj chefreprezentanto de UEA che UN/Ghenevo